# TEA-BULTENO

7A JARO | MAJO - JUNIO 2004 | NUMEROJ 5-6


## Programo en Tea - Majo

| | |
|---|---|
| 04 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 07 - vendredo | h. 20.00 - Filmo pri Egiptio – 1ª parto |
| 11 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| **Ekster TEA** 14 - vendredo | Je la 17ª horo, en la Reprezenta Komunuma Salono de **Bolzano**: **Inaŭgura ceremonio de Esperanto-Strato** - ni festu ĉi tiun novan, italan ZEO-n kune kun ties iniciatinto, la nelacigebla Karl Behmann |
| 14 - vendredo | h. 20.00 - Filmo pri Egiptio – 2ª parto |
| 18 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 21 - vendredo | h. 20.00 - Aventuroj de maratoneto |
| **23 - dimanĉo** | **Ekde la 9ª h. - Vizito de esperantistoj el *Pistoia* - triesta ĉiĉeronado** |
| **23 - dimanĉo** | **h. 16.00 - Monda Preĝo por Paco - Ekumena celebrado en Triesto** *(vidu artikolon aperintan en la pasinta numero de TEA-Bulteno - pliajn informojn petu de la sekretario)* |
| 25 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 28 - vendredo | h. 20.00 - Laboroj por la ekspozicio "Artistoj el Mezeŭropo" en Muggia |
| **Ekster TEA 29 - sabato** | **Inaŭguro de Esperanto-strato en *San Vito al Tagliamento*** |

## Programo en Tea - Junio

| | |
|---|---|
| 01 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 04 - vendredo | h. 20.00 - *Lecturae Dantis* en Esperanto |
| 08 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 11 - vendredo | h. 20.00 - Ni provu interpretadi! |
| 15 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 18 - vendredo | h. 20.00 - Kartludado: rumio aŭ trisepo? |
| 22 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 25 - vendredo | h. 20.00 - Artikolo el ESPERANTO de UEA: "Edmond PRIVAT kaj la privata lernejo PRIVAT" |
| 29 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |

**Pri la eksterklubaj programoj, informoj ĉe la sekretario.**

TRIESTA ESPERANTO ASOCIO organizas en la Komunuma Artsalono *NEGRISIN - Piazza della Repubblica*, en *Muggia*, ekspozicion de pentraĵoj, kies titolo estas:



***"Artistoj el Mezeŭropo"***

La elmontrado estos vizitebla ekde la 3ª ĝis la 18ª de junio. La vizithoraro de lundo ĝis sabato estas: 10-12; 17-19.

Olepentraĵoj kaj akvareloj de jam konataj artistoj, kiaj János B. Tóth kaj Augusto Bartoli, estos admireblaj dum du semajnoj en la bela venecistila urbeto: vizitu ĝin ankaŭ kun amikoj kaj konatuloj, ĉefe okaze de la inaŭgura tago!

## *KIO ESTAS EXPO ?*

En la jaro 1851, la viktoriana Londono decidis organizi grandan internacian aranĝon: naskiĝis tiam la unua universala ekspozicio, rendevuo ne nur kultura, sed ankaŭ okazo por ekonomiaj kaj komercaj interŝanĝoj. Ekde tiam similaj iniciatoj ripetiĝis en multaj landoj: Italio gastigis plurajn ekspoziciojn, plej laste en Ĝenovo 1992. Nun estas Triesto kiu havas la grandiozan ŝancon, en la jaro 2008, gastigi EXPO-n, en kiu partoprenos 91 diversaj landoj, en la belega situo de Malnova Haveno, natura simbolo pri interŝanĝado, emblemo de moviĝado, preskaŭ kore de la urbocentro.

La proponita temo estas "Moviĝado de konoj", pro ties tre signifaj ligoj inter Scienca Mondo kaj Triesto mem, kie sidejas gravaj kaj prestiĝaj sciencaj kaj esploraj institucioj je internacia nivelo.

EXPO fariĝas por la urbo speciala okazo aliri mondan scenejon kaj montri sin al supozeble pli ol 5 milionoj da vizitontoj.

Tiu ĉi grandioza evento, dua pro graveco post Olimpikaj Ludoj, alportos kulturajn, komercajn, sciencajn kaj turismajn avantaĝojn.

En decembro 2004, la Internacia Oficejo por Ekspozicioj, kun sidejo en Parizo kaj kun ĉina prezidanto, ekzamenis funde la projektojn prezentitajn de la tri kandidatoj: Triesto, Zaragozo (Hispanio) kaj Tesaloniko (Grekio). Inter tiuj ĉi urboj, oni elektos tiun kiu gastigos la ekspozicion en la jaro 2008.

Oni bone komprenas kiom gravas simila evento en nia urbo. Por tion akiri, nepras flanke de ĉiuj triestanoj

entuziasmo kaj subteno: pro tio formiĝis komitato cele al envolviĝo de la tuta urbo, sendepende de kiu ajn aparteno al politika, kultura, socia medioj, por kune travivi la diversajn momentojn de kaptiga aventuro kondukanta al realiĝo de la projekto.

Ankaŭ TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO aliĝis al tiu ĉi aventuro kaj iĝis membro de la urba komitato PRO TRIESTEXPO2008 kaj klopodos kunlabori en diversaj kampoj.

Kial? Vi certe volas tion scii. Pluraj estas la motivoj, sed ni parolu nur pri la plej grava: kaj EXPO kaj la internacia lingvo Esperanto havas la saman universalan karakteron. Por universala aranĝo, kio plej taŭga ol universala lingvo? La temo estas MOVIĜADO DE KONOJ: kion vi opinias pri la ilo uzebla, uzenda kaj uzinda? Ĉu la internacia lingvo Esperanto ne devus havi ĉefan rolon en tiu "moviĝado"? Ja, konoj disvastiĝas pere de lingvo…

Nia kunlaboro aplikiĝos al informado: niaj revuoj, gazetoj povos gastigi artikolojn pri la evento, la retaj paĝoj entenos version en Esperanto, ni pretas prezenti la projekton en apudaj landoj (ĉirilate kontaktoj kun esperantistoj el Kroatio estis starigitaj); ni jam proponis kunlaboradon dum la ekspozicio kiel tradukistoj/interpretistoj en/el esperanto por vizitontoj, ni jam sugestis organizadon de lingvistika seminario, de artaj aranĝoj pere de nia lingvo, kpt ktp ktp.

Iom da laboro ĉu ne??? Iu diris ke la defio estas tro granda, riska. Jen nia respondo: jes, ĝi estas grandega, sed kial kontentiĝi per malgrandaĵo… Ni celu alten, kun entuziasmo, kun ega pasio, ĉar sen tiuj ĉi ingrediencoj eĉ ne eblas kuiri bonan kafon. Por ion atingi, oni devas multegon postuli kaj persiste agi. Spite al ĉio, ni ludos niajn kartojn por venki en tiu ĉi ludo.

*EDVIGE ACKERMANN*

## Universala Kongreso 2006 en Firenze

La estraro de UEA akceptis la inviton de ITALA ESPERANTO-FEDERACIO okazigi la 91$^{an}$ Universalan Kongreson de Esperanto en Florenco de la 29$^{a}$ de julio ĝis la 5$^{a}$ de aŭgusto 2006. Italiaj esperantistoj jam komencis labori, por ke la kongreso estu epokfara kaj jam la premisoj montras, ke certe temos pri tre zorge preparata kongreso.

Kaj nun pri preparlaboroj. UEA-prezidanto Renato Corsetti lanĉas jenan helpo-peton al itala esperantistaro:

⇨ Oni bezonas iun (prefere eĉ du homojn), kiu(j) bone konas la italan kaj Esperanton kaj kapablas instrui la italan per Esperanto en la tiel nomata "ekspres-kurso" okazanta dum la kongresa semajno por tiuj kongresanoj, kiuj deziras rapide kompreni iomete la italan. ATENTU: bona kono de la itala kaj de Esperanto estas nur antaŭkondiĉo: la vere bezonata kvalito estas kapablo instrui lingvon en maniero alloga. La kongresanoj ne estas devigataj de la gepatroj kaj de la policistoj ĉeesti la lecionojn (kiel okazas ĉe normalaj lernejanoj). Sekve ili certe voĉdonos per la piedoj, alivorte "foriros", se la kurso ne estas interesa kaj plaĉa.

⇨ Oni bezonas iun (prefere eĉ du homojn), kiu(j) bone konas Esperanton kaj la italan kaj kapablas instrui Esperanton al italoj en la kutima kurso por la loka publiko, kiun oni ofertas kunlige kun la kongreso. Ankaŭ en ĉi tiu kazo lerteco instrui estas esenca. Seriozaj interesiĝantoj anoncu sin al *uk2006.kulturaj.eventoj@esperanto.it*

## 3$^{a}$ Seminario pri Interpretado

Trento, de la 28$^{a}$ ĝis la 30$^{a}$ de majo 2004

Ĝi estas unu el la serio da staĝoj organizataj de ITALA ESPERANTO-FEDERACIO kune kun ITALA ESPERANTO-JUNULARO cele al trejnado de homoj, kiuj aktivos dum la UK-Florenco 2006. Sub la gvido de spertaj kaj kompetentaj instruantoj, la partoprenantoj povos (plu)trejniĝi en sekva (kaj eventuale samtempa) interpretado. La seminario celas homojn, kiuj jam bone kaj flue parolas Esperanton. Cele al efika trejniĝo kaj bona organizado eblos akcepti maksimume 20 partoprenantojn. Oni planas ankaŭ ekskursi tra la urbo kun loka ĉiĉerono kaj interpreti surkampe.

Alveno: vendrede posttagmeze/vespere. Foriro: dimanĉe posttagmeze. Oni komencos labori sabate matene. La partopreno estas por IEF-anoj senpaga. Do, la partoprenontoj pagos nur siajn vojaĝon kaj loĝadon. Eblos loĝi en hotelo tristela aŭ dustela, aŭ en junulargastejo. Indas aliĝi kaj rezervi tranoktejon kiel eble plej baldaŭ, precipe se oni preferas nemultekostan loĝeblon, ankaŭ pro tio ke la seminario okazos dum la pentekosta semajnfino, kiam estas antaŭvidata granda nombro da turistoj. Pliaj informoj kaj detaloj estos sendataj rekte al la aliĝantoj. Tiuperiode en Trento okazos "Popola Festo", ĉe placo *Fiera*, kie sin prezentos ĉiuj etnaj komunumoj el la Trento-regiono. Sabate vespere eblos spekti folkloraĵojn!

Pri aliĝoj kaj tranoktadoj oni sin turnu al: Maria Lucchi - telefono: 0461 829953 retadreso: angerfeld@yahoo.it

## Mallonge pri...

**Amsterdamaj studentoj al Pekino** Ĉi-somere, la universitato de Amsterdamo, Nederlando, sendos du studentojn pri lingvistiko al la UK en Pekino por la plenumo de surloka esplortasko rilate la intonacian fenomenon en Esperanto. La studenta duopo venkis konkurson, kies premio estas la staĝovojaĝo al la UK. La Amsterdama universitato jam antaŭ unu jaro agnoskis la Universalajn Kongresojn kiel formalan staĝejon. Per sia esplorraporto la studentoj akiros kreditpoentojn konforme al la normalaj universitataj reguloj.

**UK-novaĵoj** S-ro Wu Bangguo, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, estas la alta protektanto de la 89$^{a}$ Universala Kongreso. Tio estis anoncita en gazetara konferenco okazinta la 12$^{an}$ de januaro 2004 en Pekino. La redakcio de EL POPOLA ĈINIO esperas ricevi viajn gratulojn pri tio.

**Esperantistaj medicinistoj en Pekino** Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) jam estas organizanta sian dumkongresan programon en Pekino. Post la jarkunveno okazos vizito de iu medicina instituto, kliniko aŭ farmacia fabriko. Dum la kunveno oni decidos, kie okazos venontjare la Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco (IMEK). Kandidatiĝas du urboj: Plovdiv (Bulgario) kaj Opava (Ĉeĥio). La Estraro parolos ankaŭ pri la programoj organizendaj por inde festi la 100-jaran fondiĝ-datrevenon de la Asocio.

**Naturkuracistoj aktivas** INTERNACIA NATURKURACA ASOCIO, http://www.esp-ina.com, ne nur daŭre kaj akurate eldonas sian koloran revuon, sed ekde la Pekina UK, aperigos ĉiujare grandan eldonaĵon, 52-paĝan, kiun ricevos ĉiu kongresano en sia dokumentujo senpage. Kiel dum ĉiu UK, ankaŭ en Pekino okazos la kunsido de INA, kiu sendube estas unu el la plej interesaj fakkunsidoj, kutime alloganta pli ol cent partoprenantojn pro la interesa programo. Ĉijare, unuafoje, okazos dumkongresa ekskurso de INA por montri al interesuloj la praktikadon de ĉina naturkuracado.

*Raportis: Harald Schicke MZVerlag@web.de*

**En la Ĉina Universitato** de Administro kaj Softvaro en Pekino, la 13an de marto 2004 startis Esperanto-kurso por komencantoj, en kiu partoprenas pli ol 80 gestudentoj el la Fakultato pri Turismo Internacia. La kurson gvidas s-ro Cui Jiayou (cuijiayou@yahoo.com.cn).

**Jam pli ol dumil subskriboj por EDE** Por la politika grupo EŬROPO - DEMOKRATIO - ESPERANTO oni jam sukcesis kolekti pli ol dumil subskribojn por enskribi la unuiĝon sur la balotformularojn de la eŭropaj elektoj. Laŭ Bert Schumann, aktivulo de la grupo, eblas, ke oni atingu la necesajn 4.000 subskribojn, "se nun ĉiuj komune streĉas siajn fortojn". La Nobel-premiito pri ekonomio, profesoro Reinhard Selten, estas la ĉefkandidato de la unuiĝo en Germanio. Legu plu sur http://www.esperantoland.de/eo/plu.php?msgid=549 kie estas ankaŭ ligo al la retopaĝoj de EDE.

*Raportis: Lu Wunsch-Rolshoven <Lu@EsperantoLand.org>*

**Gvidanto de infankoruso akceptis Esperantan kanton** Nova MONDA INFANKORUSO en Västerås, Svedio, kantos ankaŭ en Esperanto la 8an de majo dum la Tago de la Infano. Kiel unua fremdlingva kanto estis elektitita IOMETE DA SUNO kies germana versio estas „Ein bisschen Frieden" (1982). La gvidanto intencas, se eblas, krei repertuaron de kantoj en diversaj lingvoj depende de la partoprenantaj infanoj. Nun ĝi ĉefe enhavas svedajn kantojn.

*Raportis: Wim Posthuma wimp@quicknet.se*

# EŬROPO KAJ LINGVAJ RAJTOJ: *necesas agi en 2004!*

Dum 2004, Eŭropa Unio pligrandiĝos kaj ankaŭ okazos eŭropaj balotoj. Tamen, la lingva problemo restas ne solvata, sed kaŝita per pseŭdo-multlingvismo favore nur al la tri pli potencaj lingvoj. Pro tiu fakto, ni riskas iri al lingva hegemonio, kaj fine unikeco, kiu endanĝerigos la lingvan kaj kulturan diversecon de Eŭropo. Tial, interalie, la esperantistoj apogas la proponon de komuna (kaj ne unika) pontolingvo neŭtrala, kiu ebligus egalecan respekton de ĉiuj lingvoj kaj efikecon por eŭropa demokratio.

Tiucele organiziĝas eŭrop-skala manifestacio por lingva demokratio en Eŭropo. La ĉefa celo de tiu agado estos paroligi plej vaste kiel eble (i.a. tra la amaskomunikiloj) pri la lingvaj aspektoj de Eŭropo por tiel konsciigi la publikon pri tiu problemo... kaj fine eble iel movemigi la politikistojn pri tiu temo. Por trafi tiun celon, ni devas esti sufiĉe multnombraj kaj buntaj por havi veran efikon. Esperantistoj iniciatis tiun manifestacion kaj ĉiuj Esperanto-asocioj el Eŭropo informos pri tiu agado en siaj respektivaj regionoj aŭ landoj.

La nomo de la manifestacio EŬROPA BUNTO signifas "*multkoloreco de Eŭropo*". Ĝi indikas la festecan flankon de tiu manifestacio multkolora pro lingva diverseco.

Tiu manifestacio do arigos:

- ★ ĉiujn Esperanto-asociojn el Eŭropo;
- ★ ĉiujn asociojn, kiuj okupiĝas pri lingvo- kaj kulturo-defendado por respekto de la lingva diverseco;
- ★ kaj ĉiujn aliajn homojn koncernatajn, konsciajn kaj interesatajn pri tiu lingva aspekto de Eŭropo.

Loko: Strasburgo (Francio), apud la Eŭropa Parlamentejo kaj Eŭropa Konsilio.
Dato: Dimanĉon la 9an de majo 2004 (Tago de Eŭropo).
Formo: Libera elekto de la lingvo por la flagrubandoj; libera enteno de la flagrubandoj (respektante deklaron de homaj kaj eŭrop-civitanaj rajtoj)
Informa servo: Gazetara konferenco kun egaleco de reprezentado de ĉiu lingvo; disponigo de tradukservo por ĉiuj reprezentataj lingvoj.

Detala Programo

09.00-11.00 *Rendevuo ĉe la "Place de l'Université" de Strasbourg*
11.00 *Bonvenigaj vortoj de la organizantoj kaj de la delegacioj*
11.30-12.30 *Manĝo & pikniko*
12.30-13.30 *Koncerto de JoMo (Jean-Marc Leclerc, de Tolosa, kiu kantas en plej multe da lingvoj laŭ libro de Guiness Records)*
14.00 *Starto de la manifestacio*
14.00-15.30 *Ne-rapida iro tra la "allée de la Robertsau" kaj "avenue de l'Europe": parado, sloganoj, banderoloj, flagoj, kantoj, dancoj, ktp.*
15.30 *Alveno ĝis la "Orangerie" (apud Eŭropaj Parlamentejo kaj Konsilio)*
15.30-16.00 *Fina parolado de grava eŭropa persono, Gazetara konferenco*
16.00-17.00 *Fino de la manifestacio,... kaj eble ĝis venonta fojo?*

Inter la 16a kaj 17a horo, okazos debato ĉe la Eŭropa Parlamentejo pri la temoj "Kiel multlingvismo en Eŭropo kaj defendado de minoritataj lingvoj povas eviti diskriminacion por respekti la fundamentajn principojn de Eŭropa Unio?". Tiun debaton povos partopreni nur cento da homoj, pro la malvasteco de la debat-ĉambro. Ĵurnalistoj estos prioritataj. Sinanoncoj al la debata moderiganto: gilbert.stammbach @ mageos.com

**Detaloj en TTT-ejo http://www.europa-bunto.org**

# Diru vian opinion!

Mi skribas mallongajn artikolojn pri Esperanto kaj ŝatus havi kelkajn citaĵojn de homoj el la tuta mondo pri:

- ♠ kiu vi estas? kiom aĝa vi estas? kion vi profesie faras? kie vi loĝas?
- ♠ kial vi eklernis Esperanton? Kiam?
- ♠ ĉu la angla ne estas iu speco de Esperanto?
- ♠ ĉu Esperanto estas facila lingvo? Ĉu ĝi estas pli facila ol la angla?
- ♠ ĉu Esperanto sukcesis aŭ malsukcesis?
- ♠ Kial pli da homoj parolas la anglan aŭ volas lerni ĝin?

La respondojn mi citos en diversaj artikoloj.
Bv. respondi al: Dafydd ap Fergus
Rete: komunikadcentro@esperanto.org

## 6ª Esperanta Eŭrop-Unia Kongreso

en Hispanio - 25ª - 29ª de aŭgusto 2004

La elektita urbo estas Bilbao, kiu troviĝas en la norda parto de la lando kaj estas la ĉefurbo de la hispana aŭtonoma regiono de Eŭskio. La kongreso ne povus okazi en alia pli taŭga loko, ĉar ĝia temo estos

EUROPA UNUIĜO:

ESPERANTO POR MULTLINGVA MONDO

kaj en Bilbao oni ĉiutage vivas en dulingva medio, kie estas uzataj kaj la Hispana (kastilja) kaj la Eŭska lingvoj. La Eŭska lingvo estas pralingvo kun nekonata origino.

Alia kialo por viziti la urbon, estas la longa tradicio de la Esperanta Klubo en Bilbao, kiu estis fondita en la jaro 1906. Dum la Hispana Intercivitana Milito (1936-39) kaj la diktatora periodo de Generalo *Franco*, Esperanto estis malpermesata en la tuta Lando. Tamen, la movado daŭrigis sekrete sian agadon kaj tiel sukcesis renaskiĝi en la jaro 1953. Ekde la jaro 1957 la Esperanta Klubo de Bilbao havas sian sidejon en la malnova parto de la urbo, en kvartalo nomata *Casco Viejo*.

Krom prelegoj, atendos vin kultura programo kun teatraĵo, muzikkoncertoj, ekskursoj, ktp. Por junuloj ni speciale organizas apartan programon, inter alie ni bonvenigas JoMo-n el Francio. Por tiuj partoprenantoj, kiuj emos restadi iom pli da tempo en Bilbao, indas mencii, ke iom antaŭ nia kongreso okazos la plej grava somera festo, nomata la *Aste Nagusia*, (esp: la Granda Semajno). En tiu periodo eblos pli ekkoni la Eŭskan kulturon. Kutimaj programeroj de tiu festo estas gastronomiaj konkursoj, tipaj Eŭskaj sportkonkursoj, interalie la famkontata internacia konkurso pri fajroarto kun partopreno de profesiaj fajroartistoj el la tuta mondo.

Por pliaj informoj, bonvolu viziti nian hejmpaĝon:
http://www.geocities.com/esperantobilbao/eue.htm

---

Por italoj: ekzistas ebleco atingi la urbon per rektaj flugoj: ekz. el Romo estas flugo la 23ªⁿ de aŭgusto je 15.15 kaj alveno en Bilbao je 17.20. Reveno la 30ªⁿ de aŭgusto, ekflugo je horo 17.50 kaj alveno je 20.05 en Fiumicino. Biletoj kostas iom malpli ol 86 eŭrojn. La flugoj estas tiuj vendataj de kompanio *Volareweb*. Por pliaj informoj - kaj por vojaĝi kune - bonvolu vin turni al Umberto Broccatelli.

**Ridangulo**

En ripoz-domo, vidva okdekjarulo enamiĝas al samaĝa vidvino: ilia amo estis tiel fulma, ke ili decidis rapide geedziĝi. Ili tuj iras en Apotekon kaj demandas la apotekiston:
- Ĉu vi havas gazojn, bandaĝojn kaj denaturigitan alhoholon?
- Jes! Respondas la apotekisto.
- Kaj, ĉu vi havas tru-seĝon, rul-seĝon kaj gluaĵon por proteza dentaro?
- Kompreneble! Respondas la apotekisto.
- Kaj, ĉu vi havas lambastonojn, lit-pelvon, liturinujon, kontraŭdolorajn supozitorojn kaj kontraŭreŭmatismajn ŝmiraĵojn?
- Memkompreneble! Respondas la apotekisto.

Rigardante sian amatinon en la okulojn, la vidvo diras:
- Vidu, karulino, finfine ni trovis la butikon de la donaclisto por nia geedziĝa festo!

---

**Fonto de artikoloj: RET-INFO, NUN kaj NOVA SENTO.**

## SENATANO EN LA PARADIZO

*(aŭtoro nekonata, trad. James Rezende Piton)*

Senatano trankvile piediris, kiam aŭtomobilo trafis lin kaj li mortis. Lia animo atingas la Paradizon kaj renkontas Sanktan Petron ĉe la enirejo.
- Bonvenon al la Paradizo! - diras Sankta Petro. Antaŭ ol eniri, estas problemeto. Ni maloftege trovas parlamentanojn tie ĉi, ĉu vi scias? Ni do ne certas pri tio, kion fari pri vi.
- Mi ne vidas problemon. Sufiĉas allasi min.
- Mi ja ŝatus tion fari, sed estas superaj ordoj. Ni faru la jenon: vi pasigu unu tagon en la Infero kaj alian en la Paradizo. Tiam vi povos elekti kie vi pasigos la eternecon.
- Ne, ne necesas, mi jam decidis. Mi volas la Paradizon - diras la senatano.
- Pardonon, sed ni havas niajn regulojn.

Tiel Sankta Petro kondukas lin al lifto kaj li malsupreniras, malsupreniras, malsupreniras... ĝis la Infero. La pordo malfermiĝas kaj li troviĝas meze de belega golfludejo. Proksime li vidas klubon antaŭ kiu estas liaj iamaj amikoj kaj aliaj politikistoj iam konataj. Ĉiuj tre feliĉas en siaj kostumoj. Oni salutas, brakumas lin kaj ili parolas pri la bonaj tempoj, kiam ili riĉiĝis danke al la trompebla popolo. Ili senstreĉe ludas kaj poste manĝas omaron kaj kaviaron. La Diablo mem ĉeestas, tre amikema kaj sociema estaĵo, kiu la tutan tempon dancas kaj rakontas anekdotojn. Ili tiel amuziĝas, ke subite la senatano rimarkas, ke jam estas tempo reiri al la ĉielo. Ĉiuj adiaŭas lin per brakumoj kaj mansvingas dum la lifto iras supren. Ĝi supreniras, supreniras, supreniras... kaj la pordo denove malfermiĝas. Sankta Petro atendas lin. Nun estas tempo por viziti la Paradizon.

Li pasigas 24 horojn en grupo de feliĉaj animoj, kiuj iras de nubo al nubo, ludante kaj kantante. Ĉio bone marŝas, la tago finiĝas kaj Sankta Petro revenas.
- Kaj do? Vi pasigis unu tagon en la Infero kaj unu en la Paradizo. Elektu nun vian porĉiaman loĝejon.

Li pripensas dum unu minuto kaj respondas:
- Nu... la Paradizo estas tre bona, sed mi kredas, ke mi pli ĝuos la Inferon.

Sankta Petro kondukas lin al la lifto kaj li malsupreniras, malsupreniras, malsupreniras... ĝis la Infero. La pordo malfermiĝas kaj li vidas senfinan rubaĵejon. Tie li vidas ĉiujn amikojn en ĉifitaj, malpuraj vestaĵoj kaj ili enmetas rubaĵon en nigrajn sakojn. La Diablo venas renkonte al li kaj bonvenigas lin.
- Mi ne komprenas - balbutas la senatano. Hieraŭ mi estis tie ĉi, en golfludejo, en klubo, kun omaro kaj kaviaro... kaj ni dancis kaj amuziĝis la tutan tempon. Nun mi vidas tiun ĉi mondaĉon plenan je rubaĵo kaj miaj amikoj en mizera situacio.

La Diablo ridetas, palpebrumas kaj diras:
- Hieraŭ ni estis en balotkampanjo. Nun ni jam sukcesis ricevi vian voĉon.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via del Coroneo 15 - 34133 Trieste
**tel/fakso**: +39 040 763128
**Reto**: esperantotrieste@adriacom.it; nored@estelnet.it
**http**://arte.triesteincontra.it/esperanto
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

## *Solvo de la Konkurso "Lerni geografie"*



Partoprenis en la konkurso nur 2 kuraĝaj konkursemuloj: Ermigi RODARI el Milano kaj la Teamo VIGLE VERDAJ VETEMULOJ el Triesto. Sed neniu el ili sukcesis enpoŝigi la 50-eŭran bileton. Kaj nun plue cerbumu pri la solva prezentado de la elpensinto de tiu ĉi konkurso.

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1 | Agrigento | Agri, gento | Agrigento interesiĝas pri semado |
| 2 | Avellino | Avel(o)lino | Avellino ankoraŭ ne ekzistas |
| 3 | Bari | Bari | Oni decidis bari la vojon |
| 4 | Belluno | Bela luno | Ĉi nokte estis belluno |
| 5 | Benevento | Vento benanta | Hodiaŭ spiris benevento |
| 6 | Bergamo | Gamo da beroj | Diversspeca bergamo |
| 7 | Ferrara | Rara fero | La distilita akvo estas fer-rara |
| 8 | Genova | Ge-nova | Nova paro da ge-samideanoj (PAG, § 419, Rim 2) |
| 9 | Grosseto | Gros, Seto | Gros-seto devis labori ĉar liaj gepatroj manĝis la pomon en Edeno |
| 10 | Imperia | Apartenanta al imperio | Imperia regado |
| 11 | Latina | Rilata al la latinoj | La latina lingvo |
| 12 | Livorno | Orno de liva flanko | La livorno aparte brilis |
| 13 | Lodi | Uzi lodon | *(lodo=ilo konsistanta el pezilo kaj ŝnuro, servanta al la: a. maristo, por mezuri la profundecon de maro, lago b. masonisto por determini la vertikalecon de muro)* Maristo kaj masonisto ofte devas lodi |
| 14 | Macerata | Korpo lasata en malvarma likvo, por solvi ĝiajn solveblajn substancojn | La macerata malto |
| 15 | Mantova | Mant, ova | La mantova detruado |
| 16 | Matera | Ero de tapiŝo el plektita pajlo | Matera forĵetaĵo |
| 17 | Messina | Sina meso=interno, sino de meso, de peritonea refaldo | Messina ulcero |
| 18 | Milano | Ano de "mil" | Garibaldi estis mil-ano |
| 19 | Novara | Aro da novaj aferoj | Novara panoramo |
| 20 | Nuoro | Nu-oro=oro el la Ĉina parto de Salveno | Tio estas nu-oro |
| 21 | Oristano | Ano de oristoj | La oristano iris al sia klubejo |
| 22 | Padova | Ovo de pado | La serĉado de padova spuro estis intensa |
| 23 | Parma | Adjektivo de Parmo | La parma futbalteamo estas en danĝero |
| 24 | Pesaro | Aro da pesoj *(peso=monunuo en diversaj sud-amerikaj landoj)* | Pesaro estis du kilogramojn peza |
| 25 | Pordenone | Pord-enone | Oni malkovris novan kemian elementon, kiu estis nomata "Pordo". Oni kombinis ĝin kun la grupiĝo "enono". Naskiĝis nova substanco, nomata "pordenono" el kiu devenis novaj aferoj, pordenone faritaj |
| 26 | Trieste | Adverbo de Triesto | La ĝuemuloj diboĉas trieste |
| 27 | Urbino | Ino de Urbo | En fantazia fabelo oni rakontas, ke Virurbo edziĝis al Urb-ino |
| 28 | Pisa | Pisa | Pisa lageto farita de bebo |
| 29 | Prato | Negranda herbejo en farmodomo | Lia prato estis bela |
| 30 | Roma | Adjektivo de Roma | La roma kamparo |
| 31 | Siena | Ruĝebruna okro, uzata en farboj | Siena tero estas bezonata de pentristo |
| 32 | Taranto | Kiu determinas la pezon de taro | La aŭtoritata taranto kontrolis la pezon de la kamiono |
| 33 | Teramo | Amo al la tero | La kultivista teramo estas proverba |
| 34 | Terni | Spasme kaj brue elspiri aeron per la nazo kaj la buŝo pro subita ekscito | Oni aŭdis brue terni |
| 35 | Trapani | Funkcii kiel ano de Trapo (=trappista). (PAG, § 432, Rim 3) | Oni deziris trapani |